

# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3.00 == german. markoj 3.30 ==  
frankoj 4.25 == rejsoj 800 == rubloj 1.50

Pago por anoncoj:

15 òre == 15 pfenigoj == 20 centimoj ==  
8 kopekoj == por duonpaĝa petiflinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista. Uppsala. Sverige. (Svedujo.)*

---

Uppsala.

Augusto 1896.

N:o 8.

---

## Kion traduki?

“Antaŭnelonge mi konatiĝis kun la lingvo Esperanto, kiu tre plaĉas al mi. Mi tre deziras esti utila al la lingvo kaj laŭforte helpi al ĝia progreso. Sed mi havas tre malmultajn konatojn kaj nenian talenton paroli antaŭ la publiko. Mi estas malriĉa kaj ne povas helpi materiale. Talenton de verkisto mi ankaŭ ne havas, sed mi povus ion traduki kaj tiamaniere akceli la sukceson de nia kara Esperanto. Tamen mi ne scias, kion mi devas elekti por la tradukado, por ke mia laboro ne estu senutila kaj ne perdiĝu vane. Mi esperas, ke Vi ne rifuzos konsili al mi ian verkon por la tradukado. Mi povas traduki el la lingvoj rusa, franca”, ...

Kredeble multaj esperantistoj havis la okazon ricevi leteron de pli-malpli simila enhavo. Kredeble la aŭtoro de nia lingvo ricevas centojn da similaj leteroj.

Kion traduki? Mi scias, ke en nia esperantista mondo ekzistas diversaj opinioj pri tiu ĉi demando.

Unuj pensas, ke oni devas traduki nur la verkojn de gloraj aŭtoroj, kies nomoj estas enskribitaj per grandaj literoj en la historion de l' tutmonda literaturo kaj kies verkoj faris epokon en la spirita vivo de l' homaro.

Aliaj opinias, ke ni tute ne devas tradukadi “glorajn” verkojn. Tiuj ĉi verkoj ja estas tradukitaj kaj retradukitaj preskaŭ en ĉiujn lingvojn de l' tera globo kaj ĉiu povas tralegi ilin en sia patra lingvo, se li ne tralegis ilin ĝis nun. Ni devas tradukadi la verkojn de naciaj junaj talentaj verkistoj, sufiĉe konataj en sia patrolando, sed ne sufiĉe konataj en aliaj landoj. Tiam niaj tradukoj estos legataj kun intereso kaj prezentos novaĵojn por multaj esperantistoj.

Triaĵ diras, ke oni tute ne devas tradukadi beletristikon, ĉar nia lingvo estas antaŭ ĉio lingvo de scienco, industrio kaj komerco. Klera homo de kia ajn nacio ĉiam trovos por si sufiĉe da leginda beletristika materialo, da prozo kaj da versoj, en sia parenca lingvo. Li tre malmulte bezonas internacian

lingvon kaj internacian literaturon. Sed la scienculo kaj komercisto ne povas ne senti bezonon je la lingvo internacia, ĉar li devas ofte komunikiĝi kun eksterlandanoj. Oni devas sekve traduki sciencajn kaj teknikajn traktatojn, modelojn de komercaj cirkuleroj kaj leteroj, anstataŭ perdi tempon kaj fortojn por beletristiko.

Kvaraj iras ankoraŭ pluen kaj diras, ke oni entute ne devas perdi tempon kaj elspezi monon por tradukoj, kiam ni ne havas ankoraŭ bonajn lernolibrojn kaj detalajn vortarojn en ĉiuj gravaj lingvoj. Ili diras, ke literaturaj kaj sciencaj tradukoj estas nur amuzilo aŭ ludilo por kelkaj dekoj da esperantistoj, kaj ke bonaj lernolibroj kaj vortaroj estas ne amuzo, sed afero grava kaj utila. Kiun bezonas ne sole esperantistoj, sed ankaŭ la tuta homaro, se ni volas esperantigi ĝin. Kiamaniere ellernos bone nian lingvon ia hispano, se lia lernolibro estas malgranda kaj plena da eraroj, kaj se li ne scias ian lingvon krom hispana? Kion faros italo kun sia mallonga lernolibro kaj mallougega vortareto, rumano kun sia vortareto sur unu folieto da papero, ĥino aŭ japano, turko aŭ armeno, ne havanta eĉ tion? Sekve ni forĵetu eĉ la penson pri literaturaj tradukoj, ĝis ni donos al ĉiu nacio almenaŭ unu bonan lernolibron kaj detalajn vortarojn.

Kiu estas prava? Mi opinias, ke ĉiu kaj neniu, kaj mi penos nun pravigi mian opinion.


Ĉu efektive ni ne devas zorgi pri la kresko de nia traduka literaturo kaj devas dediĉi ĉiujn fortojn al la verkado de lernolibroj kaj vortaroj? Mi pensas, ke malgraŭ la graveco de l' bonaj lernolibroj kaj detalaj vortaroj, ni ne povas kaj ne devas limigi nian agadon nur per tiuj ĉi specoj de l' literaturo. Mi pensas tiel, ĉar mi scias, ke la plej bona lernolibro kaj la plej detala vortaro ankoraŭ ne faras lingvon. Lingvo vivanta devas ja vivi; kaj lingvo vivas, kiam oni ĝin uzas, ĝin parolas kaj skribas en ĝi. Lingvo latina jam ne vivas, malgraŭ bonegaj kaj multegaj gramatikoj kaj la plej vastaj detalaj lernolibroj. Komprenoble oni povas uzadi la lingvon eĉ kiam ĝi estas morta, oni povas nun ankaŭ skribi kaj paroli en lingvo latina, sed ni ja ne deziras aferi kun rigidiĝinta malvivulo; ni rajte preferas florantan kaj progresantan lingvon-vivulon, plenan da fortoj. Sed mi ne parolos plu pri tiu ĉi klara afero, ĉar mi riskas paroli trivialaĵojn. Ni devas zorgi pri vortaroj kaj lernolibroj, ĉar tiuj ĉi vortaroj kaj lernolibroj prezentas vojojn, laŭ kiuj la popoloj iras al nia lingvo-konstruaĵo: ĉiu nova lernolibro malfermas novan vojon al nova popolo, sed ni zorgu ankaŭ, ke nia konstruaĵo estu bone aranĝita, ornamita, kaj meblita, ĉar se la nove venintaj loĝantoj ekvidos nur nudajn murojn, ili baldaŭ forkuros de ni, eĉ se nia konstruaĵo estos modelo de l'arto arĥitektura: ni zorgu sekve pri nia literaturo, ni verku kaj traduku.

Sed... kion traduki? Traduku kion vi volas, sed zorgu nur, ke la verko, kiun vi elektas, prezentu ian "internacian" intereson kaj literaturan indon — tute egale, ĉu glora aŭ neglora aŭtoro ĝin verkis. Ĉiu popolo posedas verkojn, kompreneblajn nur por ĝi mem. Tiuj ĉi verkoj tuŝas tre specialajn flankojn de l' societa vivo, kaj eksterlandano, kiu ne scias tiujn detalojn de l' vivo kaj historio de l' popolo, trovos en simila verko nenion rimarkindan, nenian intereson. Provu legi al la aliurbano la folietonon de via loka gazeto, la folietonon, en kiu oni sprite kaj brile parolas pri la lokaj "demandoj de l' tago". Kredeble li diros al vi: "la folietono estas tre sprita, sed mi ne komprenas tri kvaronojn en ĝi, ĉar mi scias nek s-ron N., kiun mokas via folietonisto, nek la friponaĵon de s-ro M., pri kiu li aludas, nek la agojn de

s-ro L., kiujn li rememoras.“ Ĉiu popolo havas verkojn, similajn al tiaj folietonoj, kaj tiel same preskaŭ nekomprenablaj por alilandanoj, kiel la folietono pri lokaj interesoj de l' urbo estas nekomprenbla por aliurbano. Tiujn ĉi verkojn ni komprenble ne devas traduki. Ĉio alia meritas tradukon, se ĝi entute meritas atenton. La verkoj de gloraj eminentaj aŭtoroj ankaŭ devas esti tradukataj, malgraŭ tio, ke oni jam tradukis ilin en naciajn lingvojn. Al mi ŝajnas, ke ni havas tro bonan ideon pri la homoj, se ni pensus, ke ĉia klera homo jam tralegis ĉion, kion skribis la genioj de l' plumo. Kontraŭe! Homo, kiu tralegis ĉion eminentan, kion kreis la grandeguloj de la literaturo, komencante de Homero kaj finante per la nunaj verkistoj de ĉiuj nacioj — tia homo estas tre *rara avis*. Ĉiu bona verko trovos legantojn, kaj ĉiu leganto, kiu ne povas legi la originalon, devas preferi la tradukon en Esperanto eĉ kompare la tradukon en sia propra lingvo, ĉar esperanta traduko povas esti pli preciza, pli proksima al la originalo, ol la traduko en lingvo nacia. Mi legis “Hamleton” en rusaj tradukoj, sed neniam el la plej bonaj rusaj tradukoj de “Hamleto” donis al mi tiom grandan plezuron, kiel la bonega esperanta traduko. Kredeble mi neniam tralegos “Iliadon” de la komenco ĝis la fino, se s-ro Kofman ial ne finos sian tradukon, kvankam kelkajn kantojn de “Iliado” mi legis en originalo. Inter la verkoj de Heine, Schiller, Ŝekspir, Byron, Molière kaj aliaj troviĝas kelkaj, kiujn mi ne havis la okazon tralegi, kaj mi atendas, ke oni tradukos ilin en nian lingvon. Sekve mi povas diri, ke eĉ la plej konataj kaj tradukataj verkoj estos legataj de niaj amikoj, ĉar mi ne estas ĝis tia grado modesta, por pensi, ke mi estas la plej granda malsaĝulo inter ĉiuj esperantistoj. Ni ne forgesu ankaŭ tiun cirkonstancon, ke tradukante glorajn verkojn, ni faras plej bonajn kaj konvinkajn provojn de nia lingvo. Lingvo, kiu transdonas belecojn kaj spriton de “Faust”, forton de “Kain”, trankvilecon de “Iliado” — tia lingvo ne povas esti kruda kaj netaŭga.

Sed tradukante glorajn verkojn, ni ne forgesu pri la verkoj malpli gloraj, sed pli interesaj por nia tempo, ni ne forgesu ankaŭ verkojn sciencajn kaj teknikajn. Mi ne povas konsideri, kio estas pli utila: traduko de ia verko klasika, aŭ de simpla bona rakonto, aŭ de ia scienca traktato. Mi scias nur, ke ĉiu bona traduko estas por ni utila, sed kio estas pli utila — tion mi ne scias. Sed mi iom timas, ke se niaj tradukistoj longe konsideros, kia traduko estas pli utila, ni riskas resti tute sen tradukoj.

V. Gernet.



## El Francujo.

(El la letero de s-ro L. de Beaufront al s-ro V. Gernet.)

Kiel vi vidos per la ĵurnalo, aldonita al mia letero, helpado karega venas al ni. Sinjoro H. Hamel, ĉefa redaktoro de la “*Revue des Beaux Arts et de Lettres*” kaj ankaŭ de “*Le Grand Sténographe*”, organo de l' stenografistoj Duployé, alportas sian partoprenon kaj kunlaboradon al nia afero. Li jam komencis kun granda lerteco en “*Le Grand Sténographe*” kaj volas daŭrigi, tiel en ĝi, kiel en lia alia ĵurnalo.

Tre konata, tre populara en Francujo kaj alfarita al 10 lingvoj la stenografio Duployé, perfekte sonskriba aŭ fonetika, estas por nia lingvo neesperita kaj nekalkulebla rimedo de propagando. Per ĝi ni atingos multegon da homoj, ne sole en Francujo, sed en ĉiuj partoj de l' mondo. Tiu sistemo de son-

skriba stenografio estas, rilate la aliajn, kiel Esperanto rilate Volapükon. Klara, logika, nekredible simpla, *tiel facile relegebla* kiel skribebla, ĝi ankoraŭ venkis ĉiujn aliajn sistemojn, en konkuro de rapideco farita, la 12-an de julio, en la urbo "Rouen".

Kiam s-ro Emile Duployé estos alfarinta sian fonetikan alfabeton al nia lingvo, ni povos uzi la sistemon kun multe da profito, ĉar skribante per tiu stenografio ni ŝparos al ni tempon kaj lacon. Tiel ni kombinos kaj unuigos du mirindajn progresojn, faritajn unu por la alia: universan sonskribadon kun universa lingvo.

**L. de Beaufront** (Parizo).




## El Rusujo.

Laŭ la nombro da amikoj de l' lingvo internacia Rusujo, kiel oni scias, ĉiam okupadis la unuan placon en la vico de landoj. La malgajaj cirkonstancoj de la pasinta jaro fortege influis la energion de multaj rusaj adeptoj, kiuj pensis, ke nia lingvo neniam eliros el la malfeliĉa stato, en kiun ĝin metis la kruela sorto. Nun, kiam la nuboj disiris kaj la ĉielo klariĝis, super niaj kapoj, ĉiam pli kaj pli ofte venas el diversaj lokoj de vastega Rusujo bonaj sciigoj pri sukcesoj de nia lingvo. Ni kun plezuro komunikas al niaj legantoj, ke en *Kremenĉug* (dank' al senlaca agado de s-ro Pesockij), en *Melitopolo* (dank' al laboro de s-ro Ŝĉavinskij), en *Teplik* (dank' al agado de s-roj Kaminskij kaj Kuŝnir), en *Krasnojarsk* (dank' al agado de s-ro Kadik), en *Tiflis* (dank' al laboroj de s-ro Avilov) formiĝis rondetoj de esperantistoj, kiuj kompreneble penas ricevi oficialan permeson de la estraro kaj fariĝos filioj de la societo "Espero". La odesa esperantistaro jam rekomencis klopodi pri la oficiala permeso kaj ni esperas, ke tiuj ĉi klopodoj baldaŭ atingos sukceson. Kiam la odesaj esperantistoj havos la permeson, ili tuj aranĝos la senpagan kaj konstantan instruadon en nia lingvo, regulan vendadon de libroj kaj regulan propagandadon.

La societo "Espero" en Peterburg ankaŭ plifortigis sian agadon. Ŝajne ni ne eraras, se eĉ diros, ke tiu ĉi societo estis la unua, kiu komencis energie labori post la ekbato de l' pasinta jaro. El diversaj notoj, presitaj en la antaŭaj numeroj de nia gazeto, la legantoj jam scias pri la eldono de "Kain", pri la literatura konkurso, pri la "Kantoj de esperantistoj", verkita de nia glora komponisto, s-ro Tanejev. Ni ne dubas, ke kiam pasos la somera libertempo, la societo "Espero" denove prezentos al ni rezultatojn de sia laborado.

Ni tre petas la amikojn de Esperanto skribi al ni pri iliaj laboroj kaj sukcesoj, por ke ni povu ĉiunmonate doni raporton pri ilia agado.

**V. Gernet.**



## Mia Polimnio.


Mi sidis sur bordo de maro,  
Mortadis ĉiela purpuro,  
Kaj baldaŭ krepusko malklara  
Ekregis sur akvo velura;  
Nur iam kaj iam rebato  
De la perdiĝintaj radioj

Rebrilis sur la akvoplato  
Kiele movemaj brilstrioj.  
Mi sidis plensole; plenagis  
En kapo la pensoj sen ĉeso,  
Sed tro multeloken disvagis,  
Ke estu difina impresio.

Rigardis mi la okcidenton —  
 La ruĝo tutege foriris,  
 Subite... l' unuan momenton  
 Mi pensis, ke mi ekdeliris.  
 Sed ne! En vestaĵo muslina,  
 Movita per movo de l' vento  
 Eliras el maro virino  
 Kaj flugas de la okcidento.  
 Mi konas ŝin, ho mia dio.  
 La ĉiam penseman, kvietan:  
 Ŝi estas diin' Polinnio,  
 Reganta la liron poetan.  
 Sed kian ŝi havas vizagon?  
 Sed kian bukedon ŝi tenas?  
 Ŝi faras l' aeran vojaĝon  
 Mallerte: ŝin jaroj tro ĝenas;  
 L' okuloj jam perdis la brilon,  
 Sulkiĝis vizaĝo la dia,  
 Ŝi perdis flugeblon facilan,  
 Foriĝis l' antaŭa gracio;  
 Forvelkis la hela koloro  
 De ŝia plenviva bukedo.  
 De kies multriĉa odoro  
 Nur restis plorinda heredo.  
 Kaj tuja sovaĝa ekfrapo  
 En mi mian koron kuntiris,  
 Rektiĝis la haroj sur kapo  
 Kaj frosto la haŭton surspiris:  
 Ĉi tiu fantomo konfuza,  
 Velkinta, malforta, senĉarma —

Si estas al mi mia Muzo  
 Mallaŭta, maljuna, malvarma.  
 Ŝi venis de la okcidento,  
 El tombo de l' suno flamanta,  
 El ĉerko de fajra talento,  
 Kaŝejo de harpo mortanta.  
 Ho, fine mi scias la veron,  
 Ke mokis je mi mia sorto,  
 Ke ĝi al mi donis esperon.  
 Ke estu pli pika la morto;  
 Ke l' kordoĵ de l' harpo de mia  
 Ne sonu la kanton sonorant,  
 Ke estu al ĝi nur misio  
 Elmeti malfortan stertoron...  
 Kaj jen ŝi alvenis lacinta,  
 Malĝoja, malbonahumora.  
 Kaj mi al la Muzo velkinta  
 Premiĝis kun ĝemo el koro.  
 Mi kaŝis l' okulojn kaj larmojn  
 En faldoj de ŝia muslino.  
 Mi ploris suferojn la varmajn  
 Kaj ploris kun mi la diino.  
 Kaj ŝi min glatadis, karesis,  
 Kaj al sia brusto min premis,  
 Sed mia doloro ne ĉesis,  
 Mi ĉiam sopiris kaj ĝemis.  
 Premado al brusto maljuna  
 Ne fajre-flamigas la koron.  
 La suno malfrue-aŭtuna  
 Ne vokas el tero la floran.

Amiko.



## Novajĵoj.

### Oferado kaj propagandado.

— De s-ro *E. Arduin* (11, Rue Turenne, Bordeaux) ni ricevis la sekvantan leteron:

“Mi promesas per tiu ĉi letero sendi kun la prezo de mia abono de la “Lingvo Internacia” por la jaro 1897  $\frac{1}{4}$  % de la mendoj, kiujn mi ricevos dank’ al la lingvo Esperanto; mi forlasas la uzon de la mono al la bontrovo de D-ro Zamenhof.”

S-ro Arduin estas unu el unuaj komercistoj, kiuj vaste uzas nian lingvon en siaj komunikiĝoj kun eksterlandanoj. Aĉetante vinon rekte de li, miaj amikoj ne sole evitos ĉiujn makleristojn kaj havos la produkton el la manoj de l' produktanto, sed ankaŭ faros utilon al nia afero.

— Por la gazeto ni ricevis de d-ro *Ostrovski* el Jalta 8 r. 50 k. kaj de s-ro *A. Naumov* el Vetkinsk 2 r. 66 k.

— S-roj *Gernet* kaj *Jivotovski* dissendis la propagandan broŝureton kaj la anoncon pri “Biblioteko” kaj nia gazeto al ĉiuj kuracistoj kaj aliaj per-

sonoj en Odeso. Ili posedas ankoraŭ grandan kvanton da broŝuretoj en diversaj lingvoj kaj tre petas la amikojn de nia afero sendi al ili adresojn, laŭ kiuj estus utile dissendi la broŝuron kaj aliajn propagandajn eldonojn.

### **Vojaĝoj de la esperantistoj.**

S-ro *V. Langlet* intencas reveni en Svedujon en oktobro. — S-ro *Avilov* jam finis sian vojaĝon kaj revenis en Tiflison. En Parizo li konatiĝis kun s-roj *L. de Beaufront* kaj *Lombard*. En la sekvanta somero li intencas fari pli grandan vojaĝon en diversaj landoj de Eŭropo. — S-roj *V. Ŝmurlo* kaj *Selezniet* skribis al ni, ke ili intencas viziti la ekspozicion en Niĵni-Novgorod. — S-ro *A. Grünfeld* vizitis la ekspozicion en Niĵni-Novgorod. — S-ro *Gernet* devis tute rifuzi la intencitan de li vojaĝon en tiu ĉi somero. — Pri la vojaĝo de s-ro *Zinovjev* ni ne havas sciigojn.

### **Novaj eldonoj.**

— Eliris el presejo kaj estas dissenditaj al la abonantoj paĝoj 476—482 de la “Biblioteko”. Tio ĉi estas rakonto en versoj, originale verkita de s-ro *V. Devjatnin* kaj havanta la titolon: “*Necola mortiginto*”. La malnovaj esperantistoj tre bone devas scii la talenton de l’ tradukinto de “*Demono*” kaj nun ni povas nur diri, ke lia talento ne malgrandiĝis dum la sufiĉe longa tempo, kiam li nenion verkis. Ni povas nur bedaŭri, ke s-ro *Devjatnin* tiom malofte donacas al la esperantistoj siajn belajn verkojn.

— Eliris ankaŭ paĝoj 483—514 de la “Biblioteko”. Tiuj ĉi paĝoj prezentas la unuan kajeron de l’ rakonto de *Lermontov*: “*Princidino Mary*”. Tradukon faris s-ro *E. de Wahl*. La komenco de l’ verko jam estis eldonita antaŭ 7 jaroj (sub la nepreciza titolo “*Princino Mary*”). Ĉiu abonanto de la “Biblioteko”, kiu posedas tiun ĉi verkon (N:o 30 de nia literaturo) havas la rajton redoni ĝin al d-ro *Zamenhof*, kiu dekalkulos al li por tio 25 kop. el lia ŝuldo por la “Biblioteko”. — La verko estas tradukita en bonega lingvo kaj sendube tre plaĉos al la esperantistoj, kiuj ne scias la originalon.

— Ni ricevis el presejo la svedan (N:o 91) kaj portugalan (N:o 96) tradukojn de la malgranda propaganda broŝureto. La portugala eldono (traduko de s-ro *Costa e Almeida*) prezentas tradukon de l’ rusa N:o 85. La sveda eldono portas la titolon “*Esperanto kiel lingvo de korespondado kaj de turistoj*”, estas prilaborita de s-ro *V. Langlet* kaj krom ĉio, kion enhavas la rusa, pola, franca kaj germana eldonoj, enhavas ankoraŭ la raportojn pri nia lingvo de s-ro *J. A. Lundell*, profesoro en Uppsala universitato, kaj s-ro *Cl. Adelsköld*, membro de l’ sveda Akademio de Sciencoj. Ĉar tiuj ĉi raporto povas esti utilaj ne sole en Svedujo, ni presas ilin ĉi-tie en traduko.

S-ro profesoro *J. A. Lundell* skribas:

Uppsala, 10-an de aprilo 1896.

“Mi iom konatiĝis kun la lingvo Esperanto, kiel ankaŭ kun kelkaj aliaj artaj lingvoj de nuna kaj pasinta tempo. Ne volante esprimi ian opinion en la demando, en kia mezuro aŭ en kiuj regionoj arta lingvo povus prosperi anstataŭigi la lingvojn naturajn, mi ne povas eviti vidi, ke en komparo kun aliaj tiaj lingvoj Esperanto havas tre grandajn preferojn. Se mi nur komparas la du konstruitajn lingvojn, kiuj ĝis nun akiris la plej grandan nombron da anoj: Volapük kaj Esperanto, al mi ŝajnas, ke Esperanto preferinde distingiĝas per tio ĉi:

1) per fonetiko pli kontentiganta: la elparolo ne devas alporti gravajn malfacilecojn por la nunaj kulturaj popoloj;

2) per esence analiza konstruo en rilatoj gramatikaj, laŭ kio ĝi sekvas la tendencojn, kiujn precipe sekvas (ne sole en la lingvoj hindo-eŭropaj) la lingva progreso moderna:

3) Esperanto preferinde uzas la provizon da vortoj vere internaciaj, ne kripligante kiel Volapük la vortformojn malrekoneble (kaj tute kaprice).

Per ĉio tio ĉi Esperanto — certe estante malproksime de povi esti rigardata kiel ideala lingvo — tamen estas lingvo facile ellernebla kaj uzebla parole kaj skribe, kaj kiu en kelkaj ne malgravaj rilatoj bone plenumas la pretendojn, kiujn oni devigaŝ fari je “internacia lingvo”.

*J. A. Lundell.*

Prof. de la universitato en Uppsala“.

S-ro *Cl. Adelsköld* donis la sekvantan raporton:

Kristiania, 8-an de aprilo 1896.

“Al la klubo Esperantista en Uppsala.

Honorita per la komisio donita de vi esprimi miajn pensojn kaj opiniojn rilate la lingvon interpopolan Esperanto, mi volas plezure plenumi vian deziron.

Certe mi povus nur tute konsenti tion, kion diris s-roj Leo Tolstoj, Max Müller kaj Henry Phillips pri lingvo interpopola kaj pri la manieroj, per kiuj Esperanto efektivigis tiun ĉi penson, ankaŭ pri la nekalkuleblaj profitoj, kiujn oni gajnus por la spirita komunikado interhoma per ĝia universala disvastigado.

Sed al la eldirita de tiuj ĉi eminentaj homoj mi kredis devi esprimi mian propran personan sperton pri la mirinda simpleco de Esperanto kaj pri la lerteco, kun kiu ĝi uzas la multoblon da vortoj, komunaj al la plejmultaj kulturpopoloj, — kio faris ĝian ellernadon tre facila.

Kaj kiam al tio ĉi venas, ke Esperanto estas riĉa je esprimiloj, harmonia kaj — estante tre bonsona — uzebla por ĉia literaturo kaj ankaŭ por kantado, tiam mi opinias, ke d-ro Zamenhof per ĝia genia ellaboro kaj prezento tre meritis la dankon de l' homaro.

Dezirante al vi ĉian feliĉon kaj sukceson en viaj laboroj por la disvastigado de Esperanto, mi subskribas kun alta estimo

*Cl. Adelsköld.*

Membro de la Reĝa Scienca Akademio.“

Estas tre dezirinde, ke tiuj ĉi leteroj (kiel ankaŭ la opinioj de s-roj Robin kaj Wasniewski) estu presitaj en la sekvantaj eldonoj de la broŝuro en aliaj lingvoj.

\* \* \*

— Eliris ankaŭ kaj estas dissenditaj kun la lastaj kajeroj de la “Biblioteko” la unuaj tri provizoraj folietoj de l' “Adresaro de novaj esperantistoj”. Tiuj ĉi folietoj prezentas ĉiumonatan senpagan aldonon al la “Biblioteko”. En la antaŭparolo d-ro Zamenhof klarigas, ke la folietoj estas eldonataj, por ke la nove aliĝantaj esperantistoj ne devu atendi tro longe, ĝis ilia adreso estos publikigita, kaj por ke la malnovaj esperantistoj sciadu ĉiam tuj pri ĉiuj nove aliĝantaj kolegoj. En la folieto N:o 1 sin trovas krom la antaŭparolo: 1) la adresoj de novaj esperantistoj, kiuj aliĝis de 1. X. 1895 ĝis 15. V. 1896 (N:roj 3603—3747; inter ili ni rimarkis kelkajn esperantistojn el *Kanada, Pretoria, Madagaskar* kaj aliaj landoj, kie nia lingvo ankoraŭ ne estas multe vastigita); 2) la adresoj de personoj, kiuj deziras *memorigi* pri siaj adresoj; 3) ŝanĝitaj adresoj (N:roj 01—04); 4) nomaro de verkoj en Esperanto, kaj

5) anoncoj pri la "Biblioteko" kaj "L. I." — En la provizora folieto N:º 2 sin trovas interalie la adresoj de personoj, kiuj aliĝis de 15. V ĝis 15. VI. 1896 (N:roj 3748- 3766), kaj en la N:º 3 — la adresoj de personoj, kiuj aliĝis de 15. VI ĝis 5. VIII. 1896 (N:roj 3767—3798).

### Progresado de la lingvo.

— En la fino de la jaro 1894 ni la unuan fojon rimarkis inter la abonantoj de la "Esperantisto" unu Kremenĉuganon, s-ron Pesockij, kiu estis tiam la sola esperantisto en Kremenĉug. En la sekvanta jaro li vendis kaj senpage disdonis en Kremenĉug ĉirkaŭ 600 lernolibrojn (N:º 56) kaj la rezultato aperis klare: nun en Kremenĉug la gazeton "Lingvo Internacia" abonas dekoj da personoj, en la kafejo de Wien (tute bona ejo, vizitata de la familioj) oni vendas la lernolibrojn kaj ricevas por la vizitantoj interalie ankaŭ nian gazeton, la "Bibliotekon" kaj "L'Étranger". Tiaj estas la fruktoj el la semoj, disĵetitaj de s-ro Pesockij. Estus tre dezirinde, ke la kremenĉugaj esperantistoj konatiĝu unu kun la alia kaj fondu rondeton aŭ, pli bone, oficialan filion de la societo "Espero", kio tute ne estas malfacila.

— S-ro B. Spektor el Tepliko skribas al ni:

"Ankoraŭ en la jaro 1889 falis en Teplik'on (Rusujo, gub. de Podolsk) la semoj de nia lingvo. Tiuj ĉi semoj ne perdiĝis, sed konserviĝis ĝis la pasinta vintro, kiam en Teplik'on venis s-ro Kaminski, multe farinta por Esperanto. Li igis la junularon ellerni la lingvon. Komence li aĉetis lernolibrojn kaj disdonis ilin prunte al ĉiu, kiu volis lerni, kaj anoncis en la urbo, ke li instruas la lingvon senpage. Poste, kiam kelkaj junuloj ellernis la lingvon kaj povis paroli en ĝi, la tuta urbeto enviis ilin, ke ili scias lingvon, kiam aliaj ne scias, kaj multaj ekdeziris konatiĝi kun la lingvo. Nun en Tepliko estas 15-20 esperantistoj, kaj preskaŭ ĉiutage aperas novaj. En la komenco de tiu ĉi somero ĉe ni aranĝiĝis jam la ĉiusabataj kunvenoj por paroli en la lingvo kaj pri ĝi. Ni kunvenas en la domo de s-ro Kušnir, tre varmega esperantisto. Mi ne dubas, ke nia rondeto rapide pligrandiĝos kaj la lingvo vastiĝos ĉiam pli kaj pli."

\* \* \*

S-ro Ostrowski skribas al ni, ke li aĉetis por si konstantan somerloĝejon en Jalta kaj nomis ĝin *Villa "Esperanto"*. La loĝejo sin trovas en tre vizitata loko de Jalta kaj granda surskribo "Esperanto" sur la pordego sendube efikos la atenton de preterirantoj. Baldaŭ s-ro Ostrowski intencas aranĝi konstantan vendadon de esperantaj libroj en Jalta.


\* \* \*

La "*Bibliotekon de la lingvo Esperanto*" abonas sekvantaj personoj: Agrell, S. (2); Costa e Almeida; Andrejewski; Blumental, A.; Burenkow, A.; Ĉiĥaĉov, N. (5); Dombrovski, A.; Eigenson, S.; Feldŝar, I.; Frankovskaja, T.; Frenkel, A.; von Geda, A.; Gernet, V. (10); Grineva, A.; Hübert, K.; Kadik, P.; Kanaloŝŝi-Leffler, F.; Kazi-Girej, N. (2); Klubo Nürnberga; Klubo Upsala (8); Laskin, V. (3); Lencart, S.; Lojko, I. (5); Milevski, I.; Nauman, A.; Naumov, A.; Ostanoviĉ, K.; Pesockaja, I.; Petrjajevski; Ruban, A.; Ŝĉavinski, T.; Sereda, M.; Ŝetalov, I. (2); Ŝirjajev, I.; Sjerkov, N.; Ŝtalberg, G.; Stankeviĉ, V.; Strzalkowski, E.; Tripolski, K.; Vanjuŝin, K.; Wasniewski, J.; Vojejkov, V. (3); Zilbernik, S.; Zotov, I.

\* \* \*



**Pri la lingvo Esperanto parolis** en la lasta tempo la sekvantaj gazetoj kaj ĵurnaloj: en unu numero de *Odesskija Novosti* estis presita la sciigo, ke baldaŭ en Odeso estos fondita klubo de esperantistoj laŭ la iniciativo de profesoro R. A. Prendel (de Odesa universitato) kaj de d-ro V. V. Filipoviĉ. Tiu ĉi sciigo ne estis preciza, ĉar en Odeso oni volas fondi ne "klubon", sed filion de la peterburga "societo" Espero, kaj ĉar la d-ro Filipoviĉ tute ne partoprenis en tiu ĉi fondigo. En la sekvanta tago la folietonisto de alia gazeto en Odeso (*Odesski Listok*), s-ro V. Doroŝeviĉ, mokis Volapükon, nian lingvon kaj precipe d-ron Filipoviĉ. S-ro Doroŝeviĉ poste, en sekvantaj numeroj, iam post iam daŭrigis siajn mokojn, sed ial li kulpigis la d-ron pro liaj okupoj je Volapük, sed ne je nia lingvo. D-ro Filipoviĉ aprobas la ideon de lingvo internacia, plene aprobas nian lingvon, sed havas tre multajn okupojn, kiuj ne permesas al li multe okupi sin je Esperanto. — En la N<sup>o</sup> 24 de l' rusa ĉiusemajna humora ĵurnalo "*Budilnik*" (Vekilo) estas presita karikaturo je esperantistoj: homo en kaŭkaza vestaro, kun esprimo de nekontento sur la vizaĝo, staras apud tri fungoj kaj, kiel oni vidas el la teksto de la karikaturo, plendas, ke ĉe li ne kreskas bonaj fungoj, sed nur muŝ-mortigiloj; la homo portas la surskribon *Tiflis*, kaj la fungoj — *societo de velocipedistoj, societo de ŝakistoj kaj societo de esperantistoj*. La karikaturo estas sendube la rezultato de artikoloj de kaŭkazaj gazetoj pri Esperanto; pri tiuj ĉi artikoloj ni raportis en nia antaŭa numero. — En la N<sup>o</sup> 8 de "*L'Etranger*" estas presita en nia lingvo daŭrigo de artikolo de s-ro *J. Janowski* "Université autodidactique" kun franca traduko de s-ro L. de Beaufront. Krom tio "*L'Etranger*" anstataŭigis sian antaŭan devizon (ad augusta per angusta) per la esperanta "Bonveno al ĉiuj!". — S-ro *de Beaufront* sendis al ni n-rojn de franca stenografia ĵurnalo "*Le Grand Sténographe*" en kiuj sin trovas multaj sciigoj pri nia lingvo. Pri "*Le Grand Sténographe*" ni detale parolos en nia sekvanta numero. Tiu ĉi ĵurnalo tute aliĝis al nia afero. — *Norrbottens Kuriren* anhavis en diversaj numeroj: 1) longan favoran artikolon pri nia lingvo kaj afero, 2) tradukon de "El la poŝto" (Esperantisto n-ro 8 jaro 1893), 3) iajn telegramojn de s-ro Jac. M. Vaz Dias en Amsterdam, 4) tradukon de "Letero el Varsovio" de s-ro Josef Vasniewski. (Ĉiujn tiujn ĉi artikolojn skribis aŭ tradukis s-ro O. V. Zeidlitz kaj almetis la rimarkojn, ke ili estas havitaj per laŭrimedo de esperanto), 5) sciigon pri la sveda-esp. gramatiko de s-ro Nylén de nekonata persono. — De la kanto de l' paco de s-ro J. M. Omberg, tradukita de s-ro V. Langlet parolas la n-ro 98 de *Jämtlands-posten* kaj la n-ro 104 de tiu ĉi gazeto anoncas la lernolibron de s-ro Nylén kaj rekomendas nian belan lingvon precipe al la junularo.



## Post legado de gazetoj. \*)

(El rusa poeto *A. N. Pleŝeĵec*.)

I.

II.

Turmentas min la vido de l' nubaj vizaĝoj  
En familio, kie regnas malkonsentoj;  
Ankoraŭ pli — la lego de la sangaj paĝoj,  
Kiu al ni predikas pri malpacoj gentaj.

Ho, kiel dolorigas min la sangaj paĝoj  
Paroladantaj pri malpaco de nacioj,  
Precize kiel la mallumo sur vizaĝoj  
De la malamigantaj membroj familiaj.

Mi amas la patrujon profunde, sen limo,  
Deziri al ĝi gloron, potencon ne ĉesas;  
Sed al malamikemoj en mia animo  
Esti je l' fremdaj gentoj tute malpermesas.

En mia koro amo por patrujo flamas,  
Kaj mi deziras, ke floru ĝi sen limo,  
Sed tamen mi popolojn fremdajn ne malamas:  
Por tio ĉi malestas loko en animo.

\*) Ni ricevis du tradukojn de tiu ĉi bela versaĵo kaj decidis presi ilin ambaŭ, por ke niaj legantoj ricevu pli precizan ideon pri la originalo.

Ĉe l' rakontoj pri venkoj, batalaj krueloj  
Ne brulas en mi sango per la rava flamo,  
Mi sendas la plej varmajn preĝojn al ĉieloj  
Ke en la homajn korojn revenu la amo.

Mi preĝas, ke jam pasu la tagoj militaj.  
Ke la gentoj forgesu la malamon sian  
Kaj per Evangelia vorto instruitaj  
Kuniĝu jam en unu aron familian.

P. A. Dombrovski.

Milita heroaĵo, sanga kaj kruela,  
Ne ĉarmas min, ne verŝas en animon raven,  
Kaj mi varmegajn preĝojn sendas al ĉielo,  
Ke anstataŭu ĝi per amo sangan glavon.

Ke, foriginte la tumulton militistan,  
Ke, ekĵetinte for de si malpacon ĉian,  
Obeu la nacioj l' Instruanton-Kriston  
Kaj el si faru unu grandan familion.

A. Kofman.



## Vivo Internacia.

### Tutmonda katalogo de libroj.

Dum la lasta internacia konferenco de bibliografio en Bruxelles oni decidis verki katalogon de libroj, broŝuroj kaj ĵurnalaj artikoloj, eldonitaj en ĉiuj landoj kaj en ĉiuj tempoj. Tia grava kaj grandega laboro prezentas multajn malfacilaĵojn, ĉar la intencita katalogo devas kontentigi tre multajn kondiĉojn. Ĝi devas esti tiel aranĝita, ke oni povu ĉiam facile trovi la titolon de ĉiu verko, se oni scias la nomon de l' aŭtoro, aŭ la enhavon de l' verko, ĝi ne devas "maljuniĝi", t. e. ĉiu nove eldonita verko devas esti facile enmetebla en la katalogon. Ĝi devas esti sufiĉe malkara kaj dividebla en partojn, por ke ĉiu povu aboni la parton, kiu lin interesas. Ĝi devas esti plena kaj internacia.

La plej bona sistemo de tiu katalogo estis proponita de s-ro Melville Devej. Ĉiuj verkoj estas dividitaj laŭ tiu ĉi sistemo en dek klasojn kaj ĉiu klaso estas notita per unu cifero. Tiel 0 notas komunajn verkojn, 1 — filozofion, 2 — religion, 3 — sociologion, 4 — filologion, 5 — sciencojn, 6 — almeteblajn sciencojn, 7 — arton, 8 — literaturon, 9 — historion. Ĉiu klaso estas dividita en dek grupojn, ĉiu grupo — en dek subgrupojn k. t. p. laŭ la bezono. La grupoj kaj subgrupoj ankaŭ estas notataj per ciferoj; la ciferon de l' grupo oni metas dekstre apud la cifero de l' klaso, la cifero de l' subgrupo estas metata dekstre apud la cifero de l' grupo k. t. p. Tiamaniere ĉiu verko estas notata per nombro, laŭ kiu oni facile povas trovi verkon en la katalogo. Ekz. la nombro 842,42 signifas ke la verko, kiun ĝi notas, apartenas al la 8-a klaso (literaturo), al la 4-a grupo de l' 8-a klaso (franca literaturo), al la 2-a subgrupo (franca teatro), al la 4-a klaso de l' subgrupo (franca teatro en klasika epoko), al la 2-a grupo de l' 4-a klaso de 2-a subgrupo (verkoj de Molière), kaj korespondas al la verkoj de Molière. La titolo de ĉiu verko estas presata sur aparta karteto, kaj la kartetojn oni ordigas laŭ la nombroj de l' verkoj. Tia katalogo estas tre oportuna por uzado kaj kredible kostos sufiĉe malkare, ĉar ĝi estos tute internacia kaj uzebla en la tuta mondo. En la konferenco de Bruxelles estis demonstrita simila katalogo de pli ol 400000 verkoj.

La konferenco de Bruxelles aprobis la sistemon kaj esprimis la deziron, ke ĉiuj landoj fondu ian internacian instituton por efektiviĝi la katalogon. Laŭ la iniciativo de l' belga registaro per la ordono de l' belga reĝo la instituto estis fondita en Bruxelles en pasinta jaro.

Ni ne dubas, ke la katalogo multe gajnus, se krom la titolo de l' verko oni presus sur ĉia karteto ankaŭ la tradukon de l' titolo en la lingvo Esperanto. Internacia katalogo devas ja esti aranĝita tute internacie.

\* \* \*

En nia januara numero ni presis la sciigon pri la *internacia poŝtsigno* proponota al la tutmonda kongreso de *L' Union postale*, kiu kolektiĝos en Washington en majo de la jaro 1897. El la raporto de l' oficejo de la tutmonda poŝta ligo ni ekscias, ke la oficejo faris multajn demandojn pri tiu ĉi poŝtsigno kaj la plej granda parto da respondoj *ne estis favoraj* al la intencata poŝtsigno.

\* \* \*

La tutmonda poŝta ligo (*L' Union postale universelle*) ĉirkaŭprenas nun 102,452,915 kvadr. kilometrojn kun 1 miljardo da loĝantoj.

—>⊗<—

## En aerostato de Parizo al la montoj norvegaj.

(El la gazeto "Vårt Land" de 27-a de novembro 1895.)

Oni skribis la 24-an de novembro 1870. La sanga dramo apud la bordoj de Seine proksimiĝadis al la fino. Kiel fera ringo la germana armeo kuŝis ĉirkaŭ la tuta Parizo. Sed oni devis en ia maniero rompi la ringon kaj por kia ajn kosto havi komunikiĝon kun la mondo ekstera, kaj kun la samlandanoj ekster la ĉefurbo. Rimedoj ekzistis: aerostatoj kaj leterkolomboj. Tiel ne sole la vortoj de la sieĝataj elvenis el Parizo: — ankaŭ havis lokon aera vojaĝo, ĝis tiam eble la plej rimarkinda: balona vojaĝo de Parizo al la montoj norvegaj dum 15 horoj plenaj da danĝeroj.

La heroo de l' aventuro estis *Paulo Rolier*, tiam havinta apenaŭ 30 jarojn, civilinĝeniero kaj kavaliro de l' honorlegiono.

En 12 hor. 15 min. de la nokto inter la 24-a kaj 25-a de novembro 1870 Rolier sin levis el Parizo per la aerostato "La ville d'Orléans". Ĉio estis farata en la plej granda sekreto pro timo ne malpli pri spionoj ol pri kugloj germanaj. Krom Rolier en la aerostato sin trovis ankaŭ s-ro *H. L. Dechamps*. Ili kunportis tre gravajn depeŝojn, kaj la projekto estis, ke ili malsupreniros ialoke en Belgujo kun tiuj ĉi depeŝoj.

Apenaŭ pasis kvin minutoj post la leviĝo, kiam la aerostato jam atingis la altecon de ĉirkaŭ 800 metroj kaj tie ĝi sin haltadis longatempe. Nun la balono sin trovis super la tendaro de l' prusoj, kaj kiam estis necese elĵeti kelkajn sakojn kun balasto, oni estis observata de la malamikoj. Pafado tre forta kontraŭ la balono estis la rezultato de tio.

Dume la barometro baldaŭ montris 2.700 metrojn. Kun eksterordinara rapideco la balono estis forportata nordokcidenten. Oni povis vidi urbojn kaj pejzaĝon malproksime en la profundo kiel panoramon ne plene klaran. Inter la tria kaj kvara horo matene ĉiam pli laŭte estis aŭdata sono monotona, kredeble de vagonaro en la norda Francujo. La sono daŭradis, nur iom pli intensiva. La vojaĝantoj opiniis, ke ili sin trovis super la belga tero.

Post mallonga tempo la amasoj de nuboj sub ili disiĝis, kaj ĉe la malklara lumo de l' luno la aerostatanoj kredis vidi vastajn, strangajn ebenaĵojn tie malsupre. Ili malpacience atendis la tagon, kiu donos al ili la eblon mal-

leviĝi ĉe popolo espere amika. Baldaŭ ili alportos al la mondo sciigojn el la sieĝita Parizo kaj plenumos la komision, por kiu ili estas senditaj.

Tamen la sorto volis alion. Jam dum kelka tempo Rolier sentis maltrankvilon, ke ne aŭdas la fajfadon de l' lokomotivoj, nur la nomitan monotonan sonon. Baldaŭ venis malmulte da lumo: ili ekvidis laŭ sia opinio nemezureblajn arbarojn, sed... ĝi estis la maro!

"Malvarma ŝvito aperis sur mia frunto", diras Rolier mem. Nenia dubo plu! Senkompate ili estas forportataj super la Norda Maro. Ili nun tute malesperis pri sia savo. Ĉiuj pensoj pri feliĉa malsuprenirado estis disigitaj de l' vento, kiu rapide kaj sovaĝe pelis ilin antaŭen. La seriozeco de la situacio paralizis la kuraĝon de Dechamps, dum Rolier post la unua teruro konservis sian sangomalvarmecon: kaj vere ĝi estis necesa nun.

Estis necese ŝpari la gason kaj per ĝia helpo resti super la akvo kiel eble plej longtempe. Eble oni povus atingi insulon aŭ kontinenton, eble ankaŭ ŝipo alportus savon. Efektive kelkaj ŝipoj aperis, sed neniu el ili ekvidis la aerostaton, kiu ĉiam pli longe envenadis en amasojn da densa nebulo. Pli longe, pli longe por renkonti la nekonatan, sed ŝajne neeviteblan morton. Rolier diris poste, ke li dum ĉio tio ĉi preskaŭ perdis la prudenton. Li prenis alumeton kaj frotis ĝin je la vesto de sia kolego: se ĝi ekfajriĝus, tuj sekvas la esplodo kaj detruo de l' balono. Sed la malseka alumeto ne ekfajriĝis.

Ili sin trovis nun en alteco de 500 metroj. Por ricevi helpon de ŝipoj eble venontaj la aerostato estis mallevita al la supraĵo de l' maro. Efektive ili ekvidis unu ŝipon, sed penante proksimiĝi al ĝi, la balono tiom malleviĝis, ke ĝi sin trovis nur ĉirkaŭ 4 metroj super la ondoj. La situacio estis danĝera. Kion fari? Oni elĵetis du sakojn da balasto, sed vane! La vento forte tiradis la balonon — unu momento, kaj ĉio perdiĝus! Tiam Rolier kuregis al la sakoj depeŝaj, detranĉis la ŝnuron kaj malmultepezigis la balonon je 65 kilogramoj. Kelkaj minutoj poste la barometro montris 4500 ĝis 5000 metrojn super la maro.

Pasis horo post horo, dum la aerostato ĉiam pli malaperadis en la maro da nebuloj. Kaj kun la aerostato — du vivantaj estaĵoj: ĉirkaŭ ili silento de morto kaj malvarmeeco, kiu frostigis ĉiujn membrojn.

Subite sub ili aperis nigra punkto; ili rigardas kaj rigardas; la balono malleviĝas, la ankro atingas ion firman, la nigra punkto estas unu abio: baldaŭ la aerostato kaj la vojaĝantoj kuŝas en la neĝo. Por unu momento ili estas savitaj! La balono ree sin levas kaj malaperas.

Kaj jen ili estas! Frostigitaj, malsategaj, en la mezo de vasta neĝamonto, en lando nekonata.

Sed oni devas fari ion, kaj malrapide ili komencas iri. Rolier falas senforta kaj senkonscia. Dechamps, kiu antaŭe perdis ĉian esperon, nun revekiĝas al nova energio kaj portas sian kolegon ĝis malgranda konstruaĵo, plena da fojno. Ili ekdormas.

En la sekvanta tago, ĉirkaŭ la 12-a horo ili trovis korton, sed neniun homon; tamen en la kuirejo ili trovis terpomojn, kiujn ili avide manĝis, kaj trinkis acidan lakton. Fine venis la loĝantoj de l' domo: du viroj, Harald kaj Klas Strand.


Per signoj ili interparolis inter si. La gastoj ricevis manĝaĵon: viandon de porko, terpomojn, lakton de kaprino, buteron kaj tre maldikan panon, kiu multe mirigis la francojn. "Estis ia papero el aveno", poste rakontis Rolier.

Subite li en la manoj de Klas vidas kesteton kun alumetoj, sur kiu li legas: "Alumetoj de Nitedal. I. L. Sundt. Kristiania". Kristiania — ha, ili sin trovas sekve en Norvegujo. Per signoj ili esprimas, ke ili volas al Kristiania. Baldaŭ ĉevalo kaj glitveturilo estis pretaj kaj ili veturis komence al Silfjord en Telemarken, kie ilin akceptis inter aliaj la direktoro Nils Nilsen kaj donis al ili ĉiajn sciigojn en bona franca lingvo. Ili falis. — laŭ tiuj ĉi sciigoj — sur Lifjell en Silfjord, ĉirkaŭ 1200 metr. super la maro, traŭrinte distancon de 1200 kilometroj dum la daŭro de 14 horoj kaj 40 minutoj.

La 30-an de novembro ili venis al Kristiania, iris al la franca general-konsulejo kaj transdonis sian depeŝon, kiu tuj per la telegrafo estis sendita tra Londono al la franca regantaro en Tours. La depeŝo enhavis tiun projekton, kiu poste estis sekvata ĉe la intencita unuigo de la Loire-armeo kun la armeo Pariza.

En Kristiania oni faris grandajn festojn por la honoro de l' du francoj. — La aerostaton, kiun oni trovis en la montoj, Rolier donacis al la universitato de Kristiania, kie oni ĝin konservas ĝis hodiaŭ.

Tradukis **Alojvo**.



## La sano.

"La sano — diris Fontenel — estas unuo, kiu donas sencon al ĉiuj nuloj de tiu ĉi vivo."

Eble eĉ la aŭtoro mem ne tute komprenis, kian profundan veron li diris! Sola senco, sola celo de tiu ĉi vivo estas feliĉo, sen kiu ni ne volas vivi kaj serĉas morton; sed la feliĉo estas atingebla nur per sano.

Por bone kompreni la lastan diron, ni devas esplori, kio estas feliĉo.

Oni kutimis opini la plej grandajn bonojn de tiu ĉi vivo, riĉecon, gloron, familian feliĉon, maleston de malsanoj; oni kutimis nomi posedanton ĉiujn tiujn ĉi bonojn feliĉulo. Sed kiel ofte oni sopiras malgraŭ ĉiuj tiuj ĉi viv-bonoj! Kiel ofte ni vidas, ke homo, kiun ni envidas en ĉiuj rilatoj, lacigas per vivado, malgajigas kaj eĉ mortigas sin sen ia videbla kaŭzo! Ĉiu scias, ke optimistoj estas pli ofte renkontataj inter malriĉaj vilaĝanoj kaj pesimistoj inter kleruloj, kiuj sin trovas en multe pli favora situacio; almenaŭ procento de sinmortiguloj en pli riĉaj klasoj estas multoble pli granda ol en la malriĉaj.

Tiel estas tute videble, ke sola favora situacio ne sufiĉas, ke por feliĉa vivo estas necesa ankoraŭ io alia. Tiu ĉi "alia" estas bonstato de nia nervaro kaj precipe de nia cerba korko, prezentanta tiun vitron, tra kiu ni rigardas la eksteran mondon. Se nia nervaro regule funkcias, se nia sango estas bona kaj bone malsekigas la korkon de l' cerbo, ni sentas nin viglaj, gajaj, feliĉaj; ni rigardas ĉion tra rozkolora vitro, ni trovas bonan flankon eĉ en la plej malfeliĉaj okazoj. Se do la sango malbonigas aŭ la funkciado de l' nervaro perdas sian regulecon, ĉio en niaj okuloj mallumiĝas, nenio nin gajigas kaj la plej bagatelaj malfeliĉoj ofte tute malesperigas nin.

La fiziologio kaj psikologio tute ne diris ankoraŭ sian lastan vorton, sed oni jam povas supozi, kio estas laŭ ili feliĉo aŭ malfeliĉo; oni jam povas supozi, ke tio ĉi estas nur bona aŭ malbona nutrado de l' cerba korko. Kaj returne, ni havas ian rajton diri, ke ĉiu plezuro estas al ni agrabla kaj ĉiu sufero malagrabla nur tial, ke l' unua plibonigas kaj la dua malplibonigas

la nutradon de l' cerbo; almenaŭ la fiziologio jam pruvis, ke ĉiu fizika doloro kunpremas arteriojn de l' cerbo, sekve malbonigas ĝian nutradon.

Tial estas tute kompreneble, kial la sama malfeliĉo tute malsame efikas malsamajn homojn. Se ni imagas du homojn — unu kun malordigita nervaro kaj malbona sango kaj la duan — bonsangulon kun fortaj, regule fonkciantaj nervoj, ni ekvidos inter ili grandegan diferencon en ĉiuj rilatoj kaj precipe en la batalado kontraŭ diversaj malfeliĉoj, malsukcesoj, doloroj, baroj.

Ĉiu ago havas sian reagon, ĉiu bato sian rebaton; ĉie ni vidas la reakcion. Ekzemple ĉiu fizika laborado, konsumanta iun muskolon, samtempe pligrandigas alfluon al ĝi de sango, plibonigas ĝian nutradon kaj fortigas ĝin. Tion saman ni vidas ankaŭ en la regno de psiĥika aŭ morala laborado, t. e. en la regno de nia batalado kontraŭ diversaj malfeliĉoj, suferoj, maldolĉoj. Ĉiu anima batalado, se ĝi havas sub ĝi sanan nervaron kaj finiĝas per venko, nur malcedemigas la batalanton kaj fortigas liajn nervojn. Se do la nervaro estas malsana, la batalado trolacigas kaj malfortigas ĝin, tiel same kiel fizika trolaborado malfortigas kaj atrofias ne sufiĉe fortan muskolon.

Tial nia malsanulo estos nur lacigata, premata per malfeliĉoj, dum la sanulo konstante ĉerpos en la batalado novajn fortojn por nova batalado.

Ĉiutlankaj sanuloj estas nun malofte renkontataj; kiam ni ilin renkontas, ni kliniĝas antaŭ ili kaj nomas ilin herooj. Tio ĉi estas tiuj malmultaj batalantoj sur diversaj arenoj, kiuj neniam laciĝas aŭ malesperiĝas, neniam cedas, kiam ajn baron ili renkontas, kiuj ĉiam venas al la celo, ĉiam venkas. Ilia sana nervaro kaj sango kontraŭas ĉiujn malsukcesojn, maldolĉojn; ili ĉiam konservas energion, memkredon kaj vivkontenton.


La saneco, kaj precipe la sana nervaro estas la unua kaj la plej grava kondiĉo de feliĉo. Ne sole la travidebleco de l' vitro, tra kiu ni ĉion rigardas, sed ankaŭ la favoreco de nia ekstera situacio dependas de ĝi plej multe: nur sanulo povas posedi bonan karakteron necesan por bonaj rilatoj kun homoj. nur li estas sufiĉe energia, persista por almiliti al si bonan situacion, nur li havos sanan idaron kaj estos bona familiestro, nur li vivos sufiĉe longe kaj sendolore. Sekve ni havas plenan rajton diri, ke por feliĉa vivo estas bezonaj nur tri objektoj: sano, sano kaj sano, kiel por milito — mono, mono kaj mono.

Bedaŭrinde la nuna homaro tute ne povas fanfaroni per sia sano: multego da malsanoj kaj precipe malsanoj nervaj severe premas ĝin. Ĉie ni vidas rapidan progreson — en la scienco kaj teĥniko, en internacia kaj nacia vivo, en leĝaro kaj juĝado: nur la plej kara, plej grava bono sur la tero — homa saŭeco — konstante regresas. Nenia dubo estas ebla: la homaro degeneras. Rapide kreskanta nombro da frenezuloj, sinmortiguloj kaj krimuloj estas la plej bona atesto de tiu ĉi terura, malgajega vero. Estas jam tempo rekte ekrigardi tiun ĉi timigantan fakton, kompreni kiel danĝera ĝi estas por la tuta civilizacio kaj komenci kontraŭ ĝi energian bataladon! La plej sankta nia devo kiel antaŭ ni mem, tiel ankaŭ antaŭ nia idaro, niaj proksimuloj, samlandanoj kaj eĉ antaŭ la tuta homaro — ŝanĝi malnormalan nunan vivadon kaj laŭforte peni saniĝi, por esti vere utilaj societanoj!

Kion do ni devas fari por saniĝi? Kompreneble ni devas adresi nin al kuracisto, sed ne al tiu, kiu nutros nin per diversaj apotekaj abomenaĵoj — li povas nur (kaj tute ne ĉiam) forigi iun malsanon, sed ne novigi nian organizon — ne, ni adresu nin al la plej granda kuracisto en la mondo, al tiu kuracisto, kiu estas en ni ĉiuj kaj kiu estas preta ĉiujminute kuraci nin, se nur ni lin aŭskultos. Tiu ĉi grandega kuracisto estas naturo. Vivu laŭ la

leĝoj de l' naturo kaj vi ne sole rezervos vian nunan sanon, sed eĉ reposedos la antaŭan jam perditan, kaj vi estos feliĉa. Eĉ la diplomitaj doktoroj pli kaj pli perdas estimon al apotekaj kuraciloj, pli kaj pli estimas sian majestan kolegon — naturon.

N. Sutkovoĵ (Ĥarkov, Rusujo).



## El Heine.

### I.

Ĉe la teotablo sidante  
La gastoj parolis pri am':  
La belaj virinoj ĝemante.  
La viroj kun laŭta deklam'.

"La am' devas esti", eldiras  
La graf: "platonika, ne pli".  
Sed lia grafino kuntiras  
La lipojn kun mok-ironi'.

La pastro: "ĝi estu ne flama,  
Alie elsekvos sufer'".  
Kaj ia fraŭlino sciama  
Miregas: "per kia manier'?"

La bela grafino raportas:  
"La amo, ĝi estas pasi'".  
Kaj al la barono alportas  
Taseton kun ĉarma graĉi'.


Ĉe l' tablo malestis la ĉarma  
Feino, la mondoornam'.  
Kun kia vereco kaj varmo  
Ŝi interparolus pri am'!

### II.

For, for de l' printempa hontema vesper'!  
La floroj timiĝas en blua aer'  
Kaj la violetoj jam tremas.  
La rozoj ruĝiĝas kun honto-esprim',  
La belaj lilioj paliĝas pro tim',  
Sopiras kaj plendas kaj ĝemas.

Ho luno amata, la floroj de l' ter'  
Montriĝas tre ĉastaj kaj piaj! En ver'  
Mi tre malprudente petolis.  
Sed mi ja ne sciis, ke ili, ho Di',  
Aŭskultis min, dum mi pri mia pasi',  
Pri amo al steloj parolis.

A. Kofman.



## "Fremdaj" vortoj en lingvo nacia.

Oni scias, ke en rusan lingvon eniris kaj ĝis nun ankoraŭ eniras multaj eksterlandaj vortoj. Tiujn ĉi vortojn uzas regule nur la klera parto de la societo, sed la simpla neklera rusa popolo, kiu tre amas ankaŭ iafoje "dandi" per malordinaraj vortetoj, uzas ilin tute originale, propramaniere. Tiel ekz., en rusa lingvo ekzistas la vorto *maratj*, kiu signifas "malpurigi", "makuli"; tiu ĉi vorto estas radike rusa. Dume en rusan lingvon eniris el okcidento, el Francujo, la konata vorto *morale*; simplaj malkleraj homoj, aŭdante ke la kleruloj ofte uzas tiun ĉi vorton, ankaŭ komencis ĝin uzi en sia parolado, sed ili nur donis al ĝi tute apartan signifon: ili devenigis tiun ĉi substantivon el la rusa verbo "maratj", t. e. "malpurigi", kaj tial al la vorto "morale" donis ofendan sencon kaj elparolas ĝin ne "moral", sed "maral". Tial ekz. kiam vilaĝano aŭdas, ke iu kulpigas lin pro io vane, li demandas kolere: "kial vi ĵetas sur min tian maralon?" Ofte ankaŭ la popolo uzas pure sciencajn aŭ teĥnikajn vortojn, tute ne sciante ilian veran signifon; ekz. al la pli-

multo da vortoj, kiuj signifas ian sciencan aŭ artistan specialecon, la popolo donas ofendan aŭ insultan sencon. Sur tiu ĉi fundamento okazas iafoje sufiĉe ridindaj scenetoj. Oni rakontas ekzemple la sekvantan anekdoton: la glora rusa scienculo-hemiisto, profesoro D. I. Mendelejev veturis unu fojon en Moskvo kun veturigisto: la elturmentita kaj maljuna ĉevalo de tiu ĉi lasta kuras tre malrapide, kaj la profesoro, perdanta la paciencon, diras al la veturigisto: "kial via ĉevalo kuras tiel malrapide? Pelu ĝin pli forte!" — La veturigisto, sin turnante de l' konduksidejo al la profesoro, respondas kun kora maldolĉo en la voĉo: "Ho, sinjoro! Tiu ĉi malbenita besto estas ne ĉevalo, sed simple ia ĥemiisto!"

En unu rusa provinca gazeto oni rakontis ankaŭ pri unu virino, kiu plendis al la juĝisto kontraŭ ia ŝerculo, kiu ŝin nomis *primadonna*.

**N. Kazi-Girej.**



## "Se morti — morti kune."

*Pentraĵeto el miaj sonĝoj.*

De A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko.

Furioze bruegas maro... Granda fortika vaporŝipo dancas sur verdaj ŝaŭmantaj ondegoj kiel korko, jen levigante sur ondon, altan kiel monto, jen ree falante en profundaĵon, por ke post unu momento denove elnaĝi sur dorso de alia ondo...

Kaj super tiu ĉi danco fajfegas terura vento kaj nigraj nubegoj renversigas kiel plumbaj grizaj bulegoj kaj duobligas teruron de l' pentraĵo, aldonante al ĝi ian mortan vidon de fino de l' mondo... Kaj kiam brueganta ondo ekŝprucas per fontano da blanka ŝaŭmo — ŝajnas, ke sur ondoj al vaporŝipo proksimiĝas morto kun ia infera rido kaj moko...

Vojaĝantoj kaŝiĝis en kajutoj kaj sidas tie senmovaj, rifuĝante unu al la alia, kun teruro aŭskultante bruegon de l' maro kaj krakadon de l' vaporŝipo. Aliaj, pli religiemaj, preĝas kun varma espero; sur kelkaj palaj vizaĝoj brilas larmoj...

Sur ferdeko restis nur vaporŝipestro kaj ŝipanoj, kurantaj kaj rekurantaj laŭ tondraj ordonoj de ilia kapitano. Sed ne... ili estas ne solaj: jen sur nazo de vaporŝipo staras iu altkreska sinjoro, al kiu forte alpremis sin ne-granda virina figuro, kiu vane petegas lin foriri de tiu ĉi danĝera loko...

De tempo al tempo kureganta ondo gutas ilin kiel pluvo kaj vento frapas per iliaj vestoj.

— Rigardu kiel belega, kiel ravinda estas la maro, — parolas la viro. — Ĝi estas simila al la eterneco kaj ĉiam la sama de centjaroj... Ĝi bruas ĝian eterneon ne esprimeblan plendon... Ĝi daŭros post ĉiuj vivoj, ĝi estos tia sama ĝis fino de nia globo... Ĉu ĝi prezentas ion timindan, ion teruran? Ne, — trankvila aŭ brueganta, — ĝi ĉiam estas belega...

— Nenion belegan mi vidas en ĝi, — respondas la virino, pli forte alrifuĝante al lia ŝultro, — mi scias nur tion, ke ĝi estas terura, terura... Mia amiko... mi petas... ni iru en kajuton... ja tie ĉi ia freneza ondo povas kapti nin kaj forporti kun si en tiun ĉi timindan maron... Ho, amiko, ni foriru, ni foriru de tie ĉi...

— Estu trankvila, mia kara, ni staras forte. Mi ripetas, ke nenian



danĝeron prezentas la bruego, ĉar nia vaporŝipo estas fortika kaj povas elteni ankoraŭ pli grandan bruegon...

Sed li ne finis sian frazon... Furioza ondego kaptis la vaporŝipon kaj ĵetis ĝin sur subakvan ŝtonegon.

Sekvis laŭta terurega krako, maŝino haltigis kaj tra la rompita truego la akvo komencis plenigadi la vaporŝipon.

Unutempe el brustoj da vojaĝantoj eksonis terura krio:

— Ni dronas... ni dronas...

Ili ĉiuj en sensaĝa teruro tumulte rapidis kolekti pakaĵon kaj elkuri sur la ferdekon, ĉar kajutoj estis jam preskaŭ tute plenaj da akvo.

— Mallevu ŝipetojn! — eksonis la ordono de l' ŝipestro.

— Plenumita!...


— Antaŭ ĉio virinojn kun infanoj... — ree ekkriis la kapitano kaj la ŝipanoj prenadis palaĵn tremantajn virinojn kaj plorantajn infanojn kaj transdonadis ilin al siaj kolegoj, kiuj jam sidis en ŝipetoj kun malfacilo penante esti pli proksime al la vaporŝipo.

— Adiaŭ, mia kara, — diris la sinjoro, kisante sian amikino, — adiaŭ por ĉiam, ĉar mi certe dronos: rigardu kiel rapide la akvo plenigas la vaporŝipon... Se Dio vin savos — diru al miaj parencoj kaj al la fianĉino, ke mi mortis kun penso pri ili... Iru do, amikino, jen la ŝipanoj atendas vin... adiaŭ!...

— Ho, ne! — ekkriis ŝi, — mi ne restigos vin... Se morti, morti kune!...

Kaj ŝi tiel forte kunpremis manojn ĉirkaŭ lia kolo, ke nek li mem, nek du fortegulaj ŝipanoj povis forŝiri ŝin de li, ĉar ili ne havis tempon batali kun tiu ĉi malforta virino, al kiu la ekscito aldonis ian eksternaturan forton...

Kaj la akvo levigadas rapide, alirante ĝis genuoj... La ŝipeto kun virinoj kaj infanoj estas jam malproksime kaj en du aliajn ŝipetojn sidigas la vojaĝantoj kaj ŝipanoj; sed ne ĉiuj povas savi sin, ĉar la akvo levigas pli kaj pli alte kaj kun ĝi alproksimiĝas la morto, malvarma, indiferenta, terura...



## De niaj abonantoj.

S-ro N. Sutkovoĵ (Rusujo, Ĥarkov, Komaja 8) skribas al ni:

“Sukceso de estonta progreso de la lingvo Esperanto multe dependas de ĝia nuna uzado, ĉar unuaj verkantoj nepre devas influi siajn posteulojn. Tial estus tre utile, se en ĉiu verkado krom la aŭtoro mem partoprenus ankaŭ aliaj esperantistoj, kompetentaj en la demandoj pri la lingvo. Oni povus atingi tion per sekvantaj rimedoj:

Kiel ajn lerta kaj scianta estas la verkanto, leganto ĉiam povas trovi en liaj skribaĵoj ne sufiĉe kompreneblan vorton, ne lertan esprimon aŭ malbone konstruitan frazon, precipe se la patrolingvo de l' aŭtoro estas fremda por la leganto. Aŭtoroj do malpli sciantaj faras eĉ pli gravajn erarojn. Ĉiuj tiuj ĉi eraroj restas nun nekorrektaj kaj aliaj verkantoj ofte ripetas ilin, rajtigante kaj fortikante per tio ilian ekzistadon en nia lingvo. Mi opinias, ke estus tre dezirinde, se ĉiu, kiu rimarkos ion nekonvenan, nekompreneblan en ia esperanta presaĵo, volu proponi pli konvenan laŭ lia opinio vorton aŭ esprimon, aŭ simple montrus la nekompreneblan por li lokon. Ju pli multaj esperantistoj prezentados siajn kritikajn rimarkojn, des pli riĉan materialon ni havos por elektado. Eĉ simpla kritika legado estos tre utila.

Ofte okazas ankaŭ, ke tiu aŭ alia verkanto ne scias trovi necesan al li kaj sufiĉe kompreneblan esprimon aŭ vorton kaj uzas malkonvenan. En similaj okazoj li devas sin turni per la "L. I." al ĉiuj esperantistoj por la helpo...

Ĉio tio ĉi postulas apartan rubrikon en la "L. I." Mi opinias, ke tiu ĉi rubriko estos tre utila al nia lingvo kaj prezentos iam riĉan materialon por plenaj detalaj gramatikoj kaj vortaroj.


Ni esperu, ke la aŭtoroj de l' verkoj, kiujn ni kritikos, ne sin sentos ofenditaj, ĉar tiu ĉi kritiko estos utila por la tuta afero, kaj antaŭ la utilo de l' afero ne devas ekzisti privataj ofendoj.

La demando, pri kiu parolas s-ro Sutkovoĵ en tiu ĉi letero estas unu el la plej gravaj, kaj ni jam havis la okazon ĝin tuŝi (vidu ekz. artikolon de s-ro *Kazi-Girej* en N:o 3, p. p. 46, 47, de s-ro *Gernet* en N:o 1, p. 8). Ni pensas, ke la rimedo montrita de s-ro Sutkovoĵ, efektive donos al ni la eblon kolekti riĉan kaj utilan gramatikan materialon, kiu gvidos la estontajn verkistojn kaj tradukistojn. Efektivigi la proponon de s-ro Sutkovoĵ estas por ni des pli facile, ke ni ne bezonas krei por ĝi apartan rubrikon, ĉar nia rubriko: "Demandoj kaj respondoj" estas tute uzebla por tiu ĉi celo. Ni invitas la legantojn partopreni en tiu ĉi laboro kaj sendi al ni rimarkojn kaj demandojn pri ĉio, kio ŝajnas al ili nekomprenebla aŭ neklara en nia literaturo kaj eĉ en nia gazeto. Estus dezirinde, ke en la laboro partoprenu ankaŭ *la novaj esperantistoj*, kiuj ankoraŭ malmulte legis en nia lingvo, ĉar estas tre grave kaj oportune scii, kiaj esprimoj kaj vortoj estas malfacile kompreneblaj por tiu, kiu ankoraŭ ne kutimiĝis al nia lingvo, por povi eviti similajn esprimojn.

Red.

S-ro *A. P.* en Kremenĉug al ni skribas:

"Sendante al vi la leteron (unuan leteron al alilandano, de kiu mi ricevis respondon) mi tute ne povis al mi prezenti, kia sento plenumigus mian koron post la ricevo de la respondo. Kun miro mi eksciis, ke nia komuna lingvo estas ne sole nur la ilo por plifaciligi la internacian korespondadon, sed ke ĝi alportas tian dolĉan senton en la koron, kiun mi ĝis nun tute ne sciis. Mi eksentis, ke la fremdulo, estas al mi tiel egale proksima kiel estas al mi ĉiu el miaj patrolandanoj, kaj mi ekvidis nun, kion mi antaŭ nelonge ne povis vidi, ke vi estas miaj fratoj, kiujn la sorto apartigis de mi per la diverslingveco, kaj kun kiuj mi ne povis konatiĝi sen la helpo de la lingvo Esperanto. El la tuta koro mi salutas vin, premante viajn manojn kaj rekomendas al niaj amikoj esperantistaj ekprovi skribi laterojn al fremduloj por ekscii, ke vere en la mondon venis nova sento."



## Informejo de esperantistoj.

Antaŭ 2 jaroj s-ro *V. Gernet* aranĝis *informejon de tradukistoj* kaj petis ĉiujn esperantistojn sciigi lin, kion ĉiu el ili tradukas aŭ intencas traduki, por havi le eblon doni al ĉiu deziranta necesajn sciigojn. Malgraŭ la okulvidebla utilo de tiu ĉi informejo, niaj amikoj montris sin fervoraj nur en la komenco. Poste ili kvazaŭ tute forgesis pri la informejo kaj ĉesis alsendadi sciigojn. Decidinte nun revivigi tiun ĉi informejon, ni treege petas niajn amikojn konstante sendadi al ni sciigojn pri siaj laboroj, pri la plenumataj tradukoj kaj originalaj verkoj. Tiujn ĉi sciigojn ni regule presados en nia gazeto sub la rubriko "*Informejo de esperantistoj*". En la sama rubriko ni presados ankaŭ aliajn informojn, utilajn por niaj legantoj.

### Estas tradukitaj aŭ tradukataj:

1. *Ruĝa floro*. Rakonto de *V. Garsin*, tradukis *I. Jivotovski*. La traduko estas jam tute preta kaj kredeble aperos en la "Biblioteko".
2. *Rememoroj* (Erinnerungen). Parolo de *H. von Helmholtz*, tradukata de *V. Gernet*.
3. *Tagmanĝo de amikoj*. Rakonto de *Fridrik Knapp*, tradukis *L. E. Meier*. (Baldaŭ estos presita en "Lingvo Internacia").

### Adresoj:

1. René Lemare Epernay (Marne), 29, rue Léger-Bertin (Francujo).
2. N. P. Evstifejov. Krosnojarsk, kontoro de inĝeniero E. K. Knorre (Rusujo).



### Demandoj kaj respondoj.

1. Kiel oni devas skribi en Esperanto la proprajn nomojn (t. e. nomojn de personoj, urboj, riveroj, montoj k. t. p.), fonetike (t. e. tiel, kiel oni ilin elparolas), aŭ ortografie (t. e. tiel, kiel oni ilin skribas en la lando, al kiu ili apartenas)? La detalajn respondojn kaj opiniojn oni adresu al la redakcio de "L. I."

2. Mi petas ĉiajn esperantistojn, kiuj scias la stenografion laŭ la metodo de Gabelsberger, sendi al mi siajn adresojn. Mia adreso estas: *Rusujo, Odeso, Puŝkinskaja, 44*, al s-ro *Gernet*, por s-ro *Jivotovski*.

3. Kiu el la esperantistoj scias bone lingvon japanan aŭ havas konatojn en Japanujo? Mi petas lin sendi al mi sian adreson. *V. Gernet* (Odeso, Puŝkinskaja, 44).

4. Ĉu ne estas dezirinde, ke la nomoj de l' kunlaborantoj de nia gazeto kaj entute de l' esperantistoj estu skribitaj [aŭ ripetitaj en krampoj] en la lingvo Esperanto? Personoj nenian sciantaj lingvon krom la patran tre malfacile komprenas kiel legi la nomojn skribitajn en granda nombro da diversaj lingvoj.

Demandas *A. Barenkoc*.

### ANONCOJ.

**L**a glora franca ĥemiisto *Lavoisier* estas juste nomata tutmonda scienculo, ĉar lia verko apartenas al la tuta homaro. Antaŭ li la scienculoj ne havis klaran ideon pri la maso de pesebla substanco kaj eĉ miksis la ideon pri substanco kun la ideoj pri fizikaj aperoj, pri varmo kaj lumo. *Lavoisier* ordigis tiun ĉi ĥaoson kaj metis firman fundamenton de l' nuna ĥemio. Oni povas juste diri, ke en la historio de scienco ne estis alia simila ekzemplo de tiom plena ŝanĝo kaj anstataŭigo de ideoj, de tia kreado de fundamento de l' scienco, kia estis farita per la cerba laboro de unu sola homo, de genia *Lavoisier* en la trankvileco de lia labora ĉambro. Kompreneble, ke la memoro pri tiu ĉi glora ĉiuhoma instruisto devas esti kara por ĉiu homo klera.

La Akademio de Sciencoj en Parizo decidis konstrui en Parizo la monumenton de *Lavoisier*. En Parizo li loĝis, laboris kaj estis mortigita. Dezirante, ke en la kreado de tiu ĉi monumento povu partopreni ĉiu, al kiu estas kara la progreso de scienco kaj la frateco de popoloj, la Akademio de Parizo prezentis subskribon por la monumento al ĉiuj popoloj de l' tero.

Esperante, ke inter la esperantistoj multaj deziros partopreni en la subskribo, ni nin turnas al ili kun humila peto sendi iliajn oferojn al s-ro *V. Gernet* (Odeso, Puŝkinskaja, 44), aŭ al la redakcio de nia gazeto. Eĉ la plej malgranda ofero estos danke akceptita. La nomoj de l' oferantoj estos publikitaj en "Lingvo Internacia" kaj en "Comptes rendus des séances de l' Académie des Sciences" de Paris.

## La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Pukinskaja. 44, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. **Uppsala**. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

## S-ro Dettling

en **Kremenĉug** (*Rusujo, gubernio de Poltava*) invitas lokajn kaj traveturantajn esperantistojn vizitadi lian „Kafejon de Wien“. Tie ili povas ricevi kafon, teon, ĉokoladon, bieron kaj vinon. — Tagmanĝo kaj vespermanĝo. — Sakoj kaj domino. — 16 gazetoj kaj ĵurnaloj. — „Lingvo Internacia“, „L' Etranger“ kaj ĉiuj novaj eldonoj en Esperanto.

**Agento-Komisiista Kontoro de M. Dettling** en Kremenĉug akceptas mendojn en Esperanto.

Eliris el presejo No 87 de nia literaturo

## FANTOMOJ,

rakonto de **V. Korolenko**.

El lingvo rusa tradukis **V. Gernet**.

La verko kostas 0,90 fr. 0,35 rub. (kun transendo 1 fr. 0,40 rub.). La monon oni povas sendi en poŝtsignoj.

Oni povas ricevi la libron de la **Uppsala Esperantoförening**, de s-ro **L. de Beaufront**, de d-ro **Zamenhof** kaj de la tradukinto.

## Depot' da semoj de M. I. Fedorovski

estas transkondukita en alian domon. La nova adreso estas:

**Rusujo, Moskvo, Mjasnickaja, domo de Staĥejev, kontraŭ la domo de Liphart.**

## Vlad. Mih. Fedorovski

ŝanĝis loĝejon kaj petas siajn korespondantojn adresadi leterojn tiel; *Moskvo, Mjasnickaja, domo de Staĥejev, kontraŭ la domo de Liphart, en depoton da semoj de M. I. Fedorovski, al V. M. Fedorovski.*

Ĉiu paginta por kvar ekzempleroj de la „**Lingvo internacia**“ ricevas la kvinan

**senpage.**

## Sinjoro E. Arduin

komercisto en **Bordeaux**, *11 rue Turenne, Francujo*, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de siaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinbereco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al li la makleran vendadon de l' produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

Eldono de la societo „Espero“

## „KAIN“

de lord **Byron**

**Kosto:** 1 franko = 70 öre = 80 pfen. = 40 kop.

La libro estas ricevebla de:

1. *Societo „Espero“*. (Peterburgo, O. Beker, Podolskaja 10, aŭ N. Borovko, Naberejnaja r. Karpovki. 20).
2. *L. Zamenhof*, Grodno.
3. *V. Gernet*, Odeso, Puŝkinkaja, 44.
4. *Klubo Esperantista en Upsala*.

**Rabato:** ĉe 100 ekz. — 40 % , ĉe 50 ekz. — 20 %.

**M**i petas ĉiujn esperantistojn sendi al mi adresojn de iliaj konatoj kaj aliaj personoj de librovendejoj kaj bibliotekoj en iliaj urboj, por ke mi povu dissendadi laŭ tiuj ĉi adresoj propagandajn broŝurojn, folietojn, lernolibrojn, leterojn k. t. p. **V. Gernet**, Odeso, Puŝkinkaja, 44.